

INTERPAROLO SUR ĈIELO

Iam demandis Dio al sankta Francisko: „Kara Francisko, vi scias ĉion pri ĝardenoj kaj nuturo, kio okazas sur la terĝlobo? Kio okazis al leontodoj, violoj, lekantetoj kaj pluraj aliaj, kiujn mi semis antaŭ longa tempo? Mi intencis perfektan planon sen prizorgado. Miaj plantoj povis kreski en iu ajn grundo, ili rezistis sekecon kaj mem obliĝis. Floroj longe floris, donacis al papilioj, abeloj, insektoj kaj grupoj de kantbirdoj sian nektaron. Mi esperis, ke mi vidos belajn ĝardenojn plenajn de multkoloraj floroj, sed nun mi vidas multe da verdaj surfacoj...”

Sankta Francisko respondas: „Tion kaŭzas speciala homa genro. Ili komencis nomi la florojn „herbaĉo” kaj kiel ili eblas, forigas ĝin kaj anstataŭas ĝin per herbo.”

La Dio: „Per herbo? Sed tio enuas, tio ne estas multkolora. Tio ne allogas abelojn, papiliojn, eĉ ne birdojn, nur larvojn de majskaraboj kaj lumbrikojn. Al tia herbajo influas ŝanĝoj de temperaturoj. Ĉu vere tiu genro volas, ke kresku nur la herbo?”

Sankta Francisko: „Jes, Sinjoro. Ili eĉ suferas kaj laboregas pro tio dum plantado. Ĉiuprintempe ili enmetas en grundon artefaritajn sterkaĵojn kaj per industriaj kemiaĵoj ekstermas aliajn plantojn, kiuj en herbejo aperas.”

La Dio: „Printempaj pluvoj kaj varmo certe kaŭzas, ke la herbo rapide kreskas. Tion certe la homoj deziras.”

Sankta Francisko: „Ŝajnas, ke ili ne estas feliĉaj, Sinjoro, ĉar kiam la herbo iom komencas kreski, ili falĉas ĝin, ofte eĉ dufoje ensemajne.”

La Dio: “Ili falĉas kaj sekigas por fojno?”

Sankta Francisko: „Ne, Sinjoro, plejparte ili pakas la herbon en sakegojn.”

La Dio: „En sakegojn? Kial? Ĉu por vendi kaj profiti?”

Sankta Francisko: „Ne, Sinjoro, ili pagas por forporto.”

La Dio: „Klarigu al mi! Ili sterkas por

kresko kaj kiam estas la herbo kreskinta, ili falĉas kaj pagas, por ke herbon oni forportu?”

Sankta Francisko: „Jes, Sinjoro.”

La Dio: „Tiu genro estas certe kontenta, kiam ni somere ŝtopigas pluvon kaj enŝaltas varmegon. Tio haltigas kreskon de la herbo kaj ilia laboro ne estas tiel pena.”

Sankta Francisko: „Eble vi ne kredos, Sinjoro. Kiam la herbo ĉesas kreski, ili rapide uzas tubojn por akvumi kaj pagas monon pro akvo, por ke ili povu daŭrigi falĉadon kaj forigon de falĉaĵoj.”

La Dio: „Tia stulteco! Almenaŭ ili lasis al si arbojn. Tio estis de mi vere bona ideo krei ilin. Printempe estas sur arboj folioj por beleco, somere por ombro. Aŭtune la folioj falas kaj faras naturan kovrilon por teni malsekon en la grundo por sekurigi arbojn kaj arbustojn ankaŭ kontraŭ frosto. Eĉ pli, la folioj servas kiel estonta sterko. Tio estas natura ciklo de vivo.”

Sankta Francisko: „Preferu sidiĝi, Sinjoro! Tiuj homoj kolektas foliojn en grandajn amasegojn kaj pagas pro forporto.ŭ

La Dio: „Strange, strange... Kaj kion oni faras por protekti radikojn de la arboj kaj arbustoj kontraŭ frosto kaj sekeco?”

Sankta Francisko: „Ili aĉetas ion en sakegoj, nomatan „mulĉo” kaj disŝutas ĝin ĉirkaŭ arboj kaj arbustoj.”

La Dio: „Kaj de kie ili akiras tiun ĉi mulĉon?”

Sankta Francisko: „Ili faligas arbojn, kaj el ili oni fabrikas tiun ĉi mulĉon.”

La Dio: „Francisko, ĉesu! Tiaj frenezaĵoj! Mia kapo doloras! Sankta Katarina, prizorgantino de kulturo, kian filmon oni anoncas en televido?”

Sankta Katarina: „La filmon „Stulta kaj pli stulta”, sed Sinjoro, la filmo vere estas tre slulta.”

La Dio: „Mi preferas dormi, pri tio al mi rakontis jam Francisko.” ■

Aŭtoro nekonata